

Franken-ștazmo  
ăi  
la moderna Prometeo  
de Mary Shelley



FEL

# *Frankenŝtajno aŭ la moderna Prometeo*

*Eldono de Flandra  
Esperanto-Ligo*

Tio ĉi estas nur informcela parta eldono  
de la verko.

# *Frankenŝtajno aŭ la moderna Prometeo*

*Ĉi tiu estas tradukaĵo de la unua eldono de 1818. Iuj kritikistoj preferas ĝin al la eldono de 1831. En la lasta letero de la unua eldono, du frazoj estas apenaŭ kompreneblaj; por tiuj du frazoj, mi tradukis surbaze de la eldono de 1831.*

*Koran dankon al Marko Rauhamaa kiu provlegis kaj korektis multajn erarojn.*

*La tradukinto*

## *Antaŭparolo*

Doktoro Darvino, kaj kelkaj verkistoj pri fiziologio el Germanio, supozas ke la evento, kiu estas la bazo de ĉi tiu fikcia rakonto, povus okazi. Oni ne pensu ke mi atribuas eĉ etan gradon da serioza kredindeco al tia imago; tamen, elektinte ĝin kiel bazon de fikcia verko, mi ne pensis ke mi simple kunteksas vicon de supernaturaj teruroj. La evento, de kiu la intrigo de la rakonto dependas, ne havas la malavantaĝojn de iu bagatela fabelo pri fantomoj aŭ sorĉado. Ĝi vekis intereson pro la noveco de la situacioj kiujn ĝi evoluigas; kaj, kvankam ĝi estas nebla kiel fizika fakto, ĝi donas perspektivon al la imagopovo por la priskribado de homaj pasioj, kiu estas pli ampleksa kaj forta ol tiuj kiujn ordinaraj rakontoj de veraj eventoj povus doni.

Do, mi klopodis konservi la veron de la bazaj principoj de homa naturo, dum mi senhezite inventis surbaze de iliaj kuniĝoj. La Iliado, la tragika poezio de Grekio, Ŝekspiro, en La Tempesto kaj Songô de Mezsomera Nokto, kaj plej speciale Miltono, en Perdita Paradizo, sekvis ĉi tiun principon; kaj la plej modesta novelisto, kiu celas distri aŭ distriĝi per siaj laboroj, rajtas, sen aroganteco, apliki al proza fikcio permeson, aŭ prefere principon, per kiu tre multaj belegaj kuniĝoj de homa emocio estas naskintaj la plej superajn ekzemplojn de poezio.

La cirkonstanco kiu estas bazo de mia rakonto estis proponita dum amikeca konversacio. Mi komencis ĝin parte kiel distraĵon, kaj parte kiel rimedon por ekzerci neprovitajn mensajn talentojn. Aliaj motivoj enmiksiĝis kun ĉi tiuj dum la laboro progresis. Mi certe ne estas indiferenta pri la maniero per kiu la eventualaj moralaj tendencoj en la sentoj aŭ roluloj efikos sur la leganto; tamen mia ĉefa zorgo ĉi-rilate estis nur eviti la lacigajn efikojn de nuntempaj noveloj, kaj elmontri

la agrablecon de familia amo, kaj la superecon de universala virto. Oni certe ne pensu ke la opinioj kiuj nature originas de la karaktero kaj situacio de la heroo estas ĉiam samaj al mia propraj opinioj; kaj estus maljuste konjekti, surbaze de la sekvantaj paĝoj, malestimon al ia ajn filozofia doktrino.

Detalo de plia intereso al la aŭtoro estas ke ĉi tiu rakonto estis komencita en la majesta regiono kiu estas ĝia ĉefa scenejo, kaj en societo kiu restos ĉiam sopirata. Mi pasigis la someron de 1816 proksime al Ĝenevo. La sezono estis malvarma kaj pluvema, kaj en la vesperoj ni kolektiĝis ĉirkaŭ bruleganta lignofajro, kaj foje distris nin per kelkaj Germanaj fabeloj pri fantomoj kiujn ni hazarde akiris. Ĉi tiuj fabeloj ekscitis en ni ludeman deziron al imitado. Du aliaj amikoj (unu el kiuj povus verki rakonton multe pli akcepteblan al la publiko ol mi povus iam ajn esperi produkti) kaj mi, ĉiu konsentis verki rakonton bazitan sur iu supernatura okazaĵo.

Tamen, la vetero subite sereniĝis; kaj miaj du amikoj lasis min por vojaĝi inter la Alpoj, kaj perdis, en la grandiozaj pejzaĝoj kiujn ili prezentas, ĉiujn memorojn de siaj vizioj pri fantomoj. La rakonto kiu sekvas estas la sola kiu estas finita.

# *Volumo 1 – Letero 1*

Al sinjorino SAVIL, Anglio.

Sankta Peterburgo, la 11-an de Decembro, 17--.

Vi ĝojos kiam vi scios ke okazis neniu katastrofo dum la komenco de entrepreno, pri kiu vi havis tre malbonajn antaŭsentojn. Mi alvenis ĉi tien hieraŭ; kaj mia unua tasko estas certigi al mia kara fratino pri mia bona farto, kaj kreskanta fido je la sukceso de mia projekto.

Mi jam estas tre norde de Londono; kaj kiam mi promenas laŭ la stratoj de Peterburgo, mi sentas malvarman nordan venteton frapetantan miajn vangojn, kio firmigas mian kuraĝon kaj plenigas min per ĝuego. Ĉu vi komprenas ĉi tiun senton? Ĉi tiu venteto, veninta de la regionoj al kiuj mi vojaĝas, donas al mi antaŭguston de iliaj glaciaj klimatoj. Kiam ĉi tiu promesplena vento vigligas min, miaj revoj fariĝas pli

pasiaj kaj vivecaj. Mi vane provas konvinki min ke la poluso estas regno de prujno kaj soleco; en mia imago ĝi ĉiam aperas kiel regiono de belo kaj ĝuego. Tie, Margareto, la suno ĉiam videblas; ĝia larĝa disko laŭiras la horizonton, radiante ĉiaman brilon. Tie – (pardonu, mia fratino, ke mi iom fidu antaŭajn esploristojn) – tie neĝo kaj prujno estas forpelitaj; kaj velante sur paca maro, ni eble bloviĝos al lando pli abunda je miraĵoj kaj belo ol ĉiuj regionoj ĝis nun malkovritaj sur la loĝebla terglobo. Ĝiaj produktaĵoj kaj vidindaĵoj eble estas unikaj, kiel la ĉielaj fenomenoj de tiuj nekonataj solejoj sendube estas. Kion *ne* atendeblas, en lando de eterna lumo? Eble mi tie malkovros la mirigan forton kiu altiras la nadlon; kaj reguligos mil ĉielajn observojn, kiuj atendas nur ĉi tiun vojaĝon por fari iliajn ŝajnajn devojiĝojn eterne akordigitaj. Mi satigos mian ardan scivolemon per la vido de mondoparto neniam antaŭe vizitita, kaj eble paŝos sur lando neniam antaŭe markita de homa piedo. Jen la logaĵoj, kaj ili sufiĉas por konkeri ĉiujn timojn pri danĝero kaj morto,

kaj por instigi min komenci ĉi tiun penan vojaĝon, kun la ĝojo kiun infano sentas kiam li ekveturas en malgranda boato, kun feriaj amikoj, por esplori riveron de sia hejma regiono. Sed, eĉ se miaj supozoj estas malĝustaj, vi ne povas negi ke mi alportos nemezureblan utilon al la tuta homaro ĝis la lasta generacio, se mi malkovros pasejon, proksiman al la poluso, al tiuj landoj kiuj nun bezonas multajn monatojn por atingi; aŭ se mi malkaŝos la sekreton de la magneto, kio –se tio eĉ eblas– fareblas nur per entrepreno kiel la mia.

Ĉi tiuj pensoj estas jam forpelintaj la maltrankvilon kiun mi sentis kiam mi komencis mian leteron, kaj mi sentas mian koron brilanta je entuziasmo kiu levas min al ĉielo; ĉar nenio trankviligas la menson tiom kiom firma celo, – punkto al kiu la animo povas fiksi sian intelektan okulon. Ĉi tiu ekspedicio estis la plej ŝatata revo de mia juneco. Mi pasie legis la rakontojn pri la diversaj vojaĝoj faritaj por atingi la Nordan Pacifikon tra la maroj kiuj ĉirkaŭas la poluson. Vi eble memoras ke la tuta

libraro de nia bona onklo Tomaso konsistis de kroniko pri ĉiuj esplor-vojaĝoj. Mia edukado estis neglektita, tamen mi pasie ĝuis legadon. Mi studis ĉi tiujn volumojn tage kaj nokte, kaj mia kono de ili pliigis tiun bedaŭron kiun mi sentis, estante infano, kiam mi eksciis ke la lasta postulo de mia mortanta patro al mia onklo estis ke li malpermesu al mi vivon de mar-vojaĝado.

Ĉi tiuj vizioj forvaporigis kiam mi tralegis, unuafoje, tiujn poetojn kies esprimado ravis mian animon, kaj levis ĝin al ĉielo. Mi ankaŭ fariĝis poeto, kaj dum unu jaro vivis en memkreita Paradizo; mi imagis ke ankaŭ mi povus akiri niĉon en la templo kie la nomoj de Homer kaj Ŝekspir estas adorataj. Vi ja scias pri mia malsukceso, kaj kiom peze la senreviĝo premis sur min. Sed tiutempe mi ricevis la heredaĵon de mia kuzo, kaj miaj pensoj redirektiĝis al sia antaŭa inklino.

Ses jaroj jam pasis ekde kiam mi definitive decidis fari mian nunan projekton. Mi povas, eĉ nun, memori la horon je kiu mi dediĉis min al ĉi tiu granda

entrepreno. Por komenci, mi al kutimigis min al malkomforto. Mi plurfoje kunvojaĝis kun balenistoj al la Norda Maro; mi volonte suferis malvarmon, malsaton, soifon, mankon de dormo; mi ofte laboris pli forte ol la ordinaraj maristoj dumtage, kaj dediĉis miajn noktojn al studado de matematiko, la teorio de medicino, kaj al tiuj fakoj de fiziko kiuj povus doni plej grandan praktikan avantaĝon al mar-esploristo. Dufoje mi fakte dungigis kiel sub-maato sur Groenlanda balenŝipo, kaj pruvis mian valoron. Mi devas konfesi ke mi sentis iom da fiero, kiam mia kapitano proponis al mi la duan rangon sur la ŝipo, kaj plej sincere petis min resti; tiom valora li konsideris miajn servojn.

Kaj nun, kara Margareto, ĉu mi ne meritas la sukceson de iu granda projekto? Mi povus pasigi mian vivon komforte kaj lukse; sed mi preferis gloron al ĉiuj tentoj kiujn riĉeco metis sur mian vojon. Ho, iu kuraĝiga voĉo respondu jese! Mia kuraĝo kaj mia volo estas firmaj; sed miaj esperoj balanciĝas, kaj mia spirito ofte estas

deprimita. Baldaŭ mi komencos longan kaj malfacilan vojaĝon, kies krizoj postulos mian tutan forton: mi devos ne nur levi la spiritojn de aliaj, sed foje subteni mian propran, kiam iliaj estos sinkantaj.

Ĉi tiam estas la plej avantaĝa tempo por vojaĝi en Rusio. Oni rapide flugas sur la neĝo en glitveturilo; la veturado estas plaĉa kaj, laŭ mi, multe pli agrabla ol tiu de Anglia fiakro. La malvarmo ne troas, se oni volvas sin en feloj – vestmaniero kiun mi jam alproprigis; ĉar estas granda diferenco inter promenado sur ferdeko, kaj senmova sidado dum horoj, kiam ne eblas ekzerci sin por malhelpi la glaciigon de sango en siaj vejnoj. Miaj ambicioj *ne* inkluzivas morton sur la poŝt-vojo inter Sankta Peterburgo kaj Arĥangelsko.

Mi ekiros al ĉi tiu urbo post du aŭ tri semajnoj; kaj mia intenco estas lui ŝipon tie, kio facile fareblas per pago de la asekuro por la posedanto, kaj dungi tiom da maristoj kiom mi konsideros necesaj, el inter tiuj kiuj spertas pri balenĉasado. Mi ne intencas ekvojaĝi antaŭ Junio. Kaj kiam mi revenos? Ho, kara fratino, kiel mi respondu

al ĉi tiu demando? Se mi sukcesos, multaj, multaj monatoj, eĉ jaroj, pasos antaŭ ol mi povos renkonti vin. Se mi malsukcesos, vi revidos min baldaŭ, aŭ neniam.

Fartu bone, mia kara, bonega  
Margareto. Ĉielo pluvigu benojn sur vin,  
kaj protektu min, por ke mi povu atesti  
denove kaj denove mian dankon pro via  
amo kaj bonkoreco.

Kun amo, via frato,  
R. VALTONO

## *Volumo 1 – Letero 2*

Al sinjorino SAVIL, Anglio.

Arĥangelsko, la 28-an de Marto, 17--.

Tempo pasas *tre* malrapide ĉi tie, dum mi estas ĉirkaŭita de prujno kaj neĝo! Tamen mi faris duan paŝon al mia entrepreno. Mi luis ŝipon, kaj mi estas okupata je kolektado de maristoj. Tiuj kiujn mi jam dungis ŝajnas esti viroj kiujn mi povas fidi, kaj certe havas nevenkeblan kuraĝon.

Sed io mankas al mi, kion mi ankoraŭ neniam povis akiri; kaj mi sentas la mankon de tio kiel plej severan malfeliĉon. Mi ne havas amikon, Margaret'. Kiam mi brilos per entuziasmo de sukceso, estos neniu kun kiu mi povos dividi mian ĝojon. Se mi estos surpremata de senreviĝo, neniu klopodos subteni min en malĝojo. Mi

surpaperigos miajn pensojn, certe, sed tio estas nekontentiga rimedo por komuniki sentojn. Mi deziras kunesti kun homo kiu simpatius al mi; kies okuloj respondus al miaj. Vi eble konsideros min romantika, mia kara fratino, sed la manko de amiko estas amara al mi. Estas neniu apud mi, ĝentila tamen kuraĝa, kun kulturita kaj vasta menso, kies gustoj similas al miaj, por aprobi aŭ plibonigi miajn planojn. Tia amiko korektus la difektojn de via povra frato! Mi estas tro hastema al agado, kaj tro senpacienca pri malfacilaĵoj. Sed eĉ pli granda malbono por mi estas ke mi estas mem-instruita: dum la unuaj dek kvar jaroj de mia vivo, mi bube ludadis ĉe parko, kaj legis nenion krom la vojaĝ-librojn de nia onklo Tomaso. Je tiu aĝo mi akiris konon de la famaj poetoj de nia propra lando; sed mi ekkomprenis nur poste, kiam mi ne plu havis ŝancon profiti de la plej gravaj avantaĝoj de tia kompreno, la neceson koni aliajn lingvojn krom tiu de mia hejmlando. Nun mi aĝas dudek ok jarojn, kaj estas fakte malpli legkapabla ol multaj lernejanoj de dek kvin jaroj. Estas vere ke mi pensas

pli, kaj ke miaj revoj estas pli ampleksaj kaj grandiozaj; sed ili bezonas 'harmonion' (kiel la pentristoj diras); kaj mi tre bezonas amikon kiu estus sufiĉe komprenema por ne malestimi min kiel romantikulon, kaj sufiĉe bonkora al mi por klopodi moderi mian menson.

Nu, ĉi tiuj plendoj estas vanaj; mi certe ne trovos amikon sur la vasta oceano, nek ĉi tie en Arĥangelsko, inter komercistoj kaj maristoj. Tamen iuj sentoj, kiuj ne apartenas al la skorio de homa naturo, batas eĉ en ĉi tiuj malmildaj brustoj. Mia leŭtenanto, ekzemple, estas viro de miriga kuraĝo kaj entreprenemo; li avidas gloron. Li estas Anglo, kaj inter siaj naciaj kaj profesiaj antaŭjuĝoj, ne moligitaj per kulturo, li retenas kelkajn plej noblajn kvalitojn de homeco. Mi unue konatiĝis kun li sur balenŝipo: sciinte ke li estis senlabora en ĉi tiu urbo, mi facile dungis lin por helpi mian entreprenon.

La navigisto estas persono de bonega karaktero, kaj rimarkinda sur la ŝipo pro siaj ĝentileco kaj milda disciplino. Li estas eĉ tiom bonkora ke li rifuzas ĉasi (kio estas

populara, kaj preskaŭ la sola distro ĉi tie), ĉar li abomenas verŝi sangon. Plie, li estas heroe malavara. Antaŭ kelkaj jaroj li amis junan Rusan virinon, de modera riĉeco; kaj kiam li estis kolektinta sufiĉe grandan sumon de kaptopremioj, la patro de la knabino konsentis doni ŝin kiel edzinon. Li renkontis sian fianĉinon unu fojon antaŭ la destinita ceremonio; ŝi estis malseka pro larmoj. Falinte antaŭ liaj piedoj, ŝi petegis al li liberigi ŝin, konfesante ke ŝi amas alian, kiu estas malriĉa, kaj ke ŝia patro neniam konsentos al la geedziĝo. Mia malavara amiko trankviligis la petanton, kaj, informite pri la nomo de ŝia amato, tuj rezignis sian celon. Li estis jam aĉetinta bienon per sia mono, kie li planis pasigi la reston de sia vivo; sed li donacis la tuton al sia am-konkurencanto, kune kun la resto de sia premiomonero por aĉeti bestojn, kaj tiam mem petis al la patro de la juna virino konsenti al ŝia edziniĝo kun sia amato. Sed la maljuna viro obstine rifuzis, konsiderante sin ligita pro honoro al mia amiko. Kiam li trovis la patron nepersvadebla, li forlasis sian landon, kaj ne revenis antaŭ ol li aŭdis

ke lia eksfianĉino estis edziniĝinta laŭ sia deziro. "Ho, nobla viro!" vi deklaras. Tia li estas; sed aliflanke, li pasigis sian tutan vivon sur ŝipo, kaj spertas nur pri ŝnuroj kaj veloj.

Sed bonvolu ne supoze ke, ĉar mi iomete plendas, aŭ ĉar mi imagas rekompencan por miaj laboroj kiun mi eble neniam akiros, ke mia volo balanciĝas. Ĝi estas tiom fiksita kiom fatalo; kaj mia vojaĝo estas prokrastita nur ĝis la vetero permesos min ekvojaĝi. La vintro estis terure severa; sed la printempo estas promesplena, kaj oni konsideras la sezonon rimarkinde frua; tiel ke, eble, mi forveturos pli frue ol mi atendis. Mi faros nenion malprudente; vi konas min sufiĉe por fidi mian prudenton kaj zorgemon kiam ajn la sekureco de aliaj estas mia respondeco.

Mi ne povas priskribi miajn sentojn, tuj antaŭ la komenco de mia projekto. Ne eblas komuniki al vi ideon pri la tremanta sento, duon-plaĉa kaj duon-tima, kiun mi spertas, preparante mian foriron. Mi iros al neesploritaj regionoj, al "la lando de nebulo

kaj neĝo," sed mi mortigos neniun albatrosan, do, ne timu pri mia sekureco.

Ĉu mi renkontos vin denove, post vojaĝo trans vastegaj maroj, reveninte preter la plej suda kabo de Afriko aŭ Ameriko? Mi ne aŭdacas atendi tian sukceson, tamen, mi ne povas elteni rigardon al la mala flanko de la bildo. Daŭre skribu al mi kiam ajn vi havos ŝancon; mi eble ricevos viajn leterojn (kvankam tio estas tre dubinda) iam kiam mi plej bezonos ilin por subteni mian spiriton. Mi amas vin tre tenere. Memoru min kun amo, se vi neniam denove ricevos leteron de mi.

Kun amo, via frato,  
R. VALTONO

## *Volumo 1 – Letero 3*

Al sinjorino SAVIL, Anglio.

La 7-an de Julio, 17--.

Mia kara fratino,

Mi haste skribas kelkajn liniojn, por diri ke mi estas sekura, kaj ke mia vojaĝo bone progresas. Ĉi tiu letero atingos Anglion per komercoŝipo kiu nun hejmeniras de Arĥangelsko; pli bonŝanca ol mi, kiu eble ne vidos mian hejmlandon dum multaj jaroj. Tamen, mi estas feliĉa: miaj maristoj estas kuraĝaj, kaj ŝajne firme dediĉitaj; kaj la plataj flosaĵoj de glacio kiuj daŭre preterpasas nin, indikantaj la danĝerojn de la regiono al kiu ni aliras, ne ŝajnas malkuraĝigi ilin. Ni estas jam atingintaj tre altan latitudon; sed estas meze de somero, kaj kvankam ne tiom varme kiom en Anglio, la sudaj ŝtormoj, kiuj blovas nin

rapide al tiuj marbordoĵ kiujn mi tre avidas atingi, donas iom da renoviga varmo, kion mi ne atendis.

Ĝis nun neniuj krizoj kiuj meritis mencion en letero okazis al ni. Unu aŭ du fortaj ŝtormoj, kaj rompiĝo de masto estas akcidentoj kiujn spertaj navigistoj apenaŭ memoras registri; kaj mi estos tre kontenta, se nenio pli malbona okazos al ni dum nia vojaĝo.

Adiaŭ, mia kara Margaret'. Estu certa ke, pro mia propra feliĉo, kaj ankaŭ pro via, mi ne hastos al danĝero. Mi estos senpanika, persistema, kaj prudenta.

Salutu por mi ĉiujn miajn Anglajn amikojn.

Plej tenere via,

R. V.

## ***Volumo 1 – Letero 4***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# *Volumo 1 – Ĉapitro 1*

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# ***Volumo 1 – Ĉapitro 2***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# ***Volumo 1 – Ĉapitro 3***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# ***Volumo 1 – Ĉapitro 4***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# ***Volumo 1 – Ĉapitro 5***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# ***Volumo 1 – Ĉapitro 6***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# ***Volumo 1 – Ĉapitro 7***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# *Volumo 2 – Ĉapitro 1*

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 2 – Ĉapitro 2***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 2 – Ĉapitro 3***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 2 – Ĉapitro 4***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## *Volumo 2 – Ĉapitro 5*

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 2 – Ĉapitro 6***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 2 – Ĉapitro 7***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 2 – Ĉapitro 8***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 2 – Ĉapitro 9***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# *Volumo 3 – Ĉapitro 1*

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 3 – Ĉapitro 2***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 3 – Ĉapitro 3***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 3 – Ĉapitro 4***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 3 – Ĉapitro 5***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 3 – Ĉapitro 6***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## ***Volumo 3 – Ĉapitro 7***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

## *Valtono, daŭrigo*

26an de Aŭgusto, 17--.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi  
provekzemplero.

# *Kolo fono*

**Titolo:** Frankenŝtajno aŭ la moderna  
Prometeo

**Aŭtoro:** Mary Shelley

**Tradukis:** Etienne Marais

**ISBN de la papera eldono:**

9789077066751

**UDK:** 82.3.892

**NUR:** 300

**VNR:** 22-03-305-668

**Leĝa depono de la papera eldono:**

D/2022/2924/1

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekenstraat 169 - 2060

Antwerpen

[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)

© 2022 FEL, Antverpeno

Tio ĉi estas nur informcela parta eldono  
de la verko.